

La festoj en Benino



François Hounsounou, Benino


La loĝantoj de la vilaĝo Aguidahoué organizis la tradician feston por renkonti la Novan Jaron 2007. Matene la infanoj kaj la plen-kresk-uloj kantis, dancis kaj iradis tra la vilaĝo de domo al domo por esprimi sian ĝojon. Tag-meze en multaj familioj ĉiuj familianoj renkontiĝis ĉe la famili-estro por kune manĝi kaj trinki, kio ne estas kutima en la aliaj tagoj pro la afrikaj tradicioj. Ĉiuj manĝis per la manoj.

Post-tag-meze eksonis la tradiciaj **tamtamoj**, kaj la homoj ekdancis. Por multaj dancoj estas necesa la granda forto, tial la ge-mal-jun-uloj ne tre volis danci. Ili trankvile sidis ĉe la tablo mal-antaŭ la dancantoj kaj kuraĝ-igis la

junulojn. La homoj estis vestitaj per la tradicia vesto, nomata *bohoub*, kiun oni povas vidi sur la fotoj.

Je la dekseca horo post-tag-meze okazis la pied-pilka ludo, aranĝita inter la vilaĝanoj kaj eks-vilaĝanoj, kiuj nun loĝas en la urbo. La vilaĝanoj venkis kaj ricevis la premion. La vilaĝanoj ludis en la ruĝaj ĉemiz-etoj, kiuj estis donacitaj de unu el la politikistoj; la junuloj, kiuj loĝas urbe, havis blublanĉajn ĉemiz-etojn. La vilaĝanoj uzis la feston ankaŭ por solvi kelkajn problemojn kaj mal-paciĝojn kun la gejunuloj.

Krom la nov-jar-festo en Benino ĉiu-jare la 1-an de **aŭgusto** okazas la festo de **sen-depend-eco**. La vilaĝanoj kun-labore kun la urb-estro organizas la



KOMPLEZE DE FRANÇOIS HOUNSOUNOU

pied-pilkajn ludojn inter la vilaĝanoj. Alia grava festo estas la festo de **vuduo**, kiu ĉiu-jare okazas la 10-an de **januaro**. Ĝi estas tre interesa por la subten-antoj de vuduo en Benino. La ĉefaj aktiv-aĵoj de tiu festo okazas en Ouidah, kiu estas la fama turisma loko pri vuduo kaj **sklaveco**.

En la sama vilaĝo la lingvo Esperanto estas akceptita por instru-ado en la baz-lern-ejo. Sed pro la manko de la instru-isto, kiu povus sen-page gvidi la kurson, la Esperanto-

movado tie **stumblis**, sed ne mortis. La gepatroj kaj la lern-ej-estro volus re-aktiv-igi la tiean Esperanto-movadon.

tamtamo – bat-muzik-ilo
aŭgusto – la lasta monato de somero

dependi (de iu) – ne esti plene libera; obei iun

sendependeco – plena libereco de la lando

vuduo – tradicia religio en Afriko

januaro – la dua monato de vintro

sklavo – la homo, kiu tute ne havas personan liberecon kaj povas fari nur tion, kion permesas lia mastro

stumpli – preskaŭ fali pro mis-paŝo



KOMPLEZE DE FRANÇOIS HOUNSOUNOU

